REVUE FRANÇAISE D'ESPERANTO

FRANCA ESPERANTISTO

PUBLICATION MENSUELLE

Mai-Juin 1960

28e Année

— N° 191 —

34, Rue de Chabrol, Paris Xe — Métro : Gare de l'Est ou Poissonnière — Tél. : PRO. 55-03.

L'EXPÉRIENCE DE VERSAILLES



Sur les marches de l'Hôtel de Ville un groupe d'élèves et leurs instituteurs autour du Colonel A. OMONT (voir p. 80)

FRANCA ESPERANTISTO
REVUE FRANÇAISE D'ESPERANTO

Secrétariat :
Mlle Y. PAULIER. - Le Secrétariat est ouvert tous les jours de 9 h. à 12 h. et de 14 à 18 h. (sauf dimanches et mardis). Pour toute réponse, joindre une enveloppe timbrée à votre adresse. - **Pour tout envoi d'argent, précisez soigneusement la destination des sommes envoyées sur le talon du mandat.**

Rédaction :
M. Jean THIERRY, UEF, 34, rue de Chabrol, PARIS X^e^. Tél. : PRO. 55-03.
Tous les articles et communiqués ne peuvent être insérés qu'aux conditions suivantes : **être toujours dactylographiés** sur un seul côté de la feuille, avec une marge pour faciliter la lecture et la correction **(un double interligne).** Tous les articles **ne se conformant pas à ces conditions seront refusés par la rédaction.**

Prière d'envoyer des clichés, et non de simples photos.

Pour toute demande de renseignements, prière de joindre **une enveloppe timbrée avec l'adresse.**

U.E.F. COTISATIONS

	F	NF
MEMBRE APPROBATEUR (Fédération, 20 ; Groupe, 30 ; UEF, 25 ; UEA, 25)	100	1
MEMBRE ACTIF	300	3
MEMBRE ACTIF (avec abonnement à la « RF d'E »	800	8
MEMBRE JUNIOR : moins de 21 ans* (TEJO) et **étudiants****	500	5
MEMBRE BIENFAITEUR UEF (avec abonn^t^ à la « RF d'E »)	1.500	15
MEMBRE A VIE UEF (avec abonnement à la « RF d'E »)	25.000	250
Abonnement seul à la REVUE FRANÇAISE D'ESPERANTO.	600	6
Pour l'étranger — Por eksterlandaj abonantoj	700	7
SUPPLEMENT POUR **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**		
MEMBRO JARLIBRO (reçoit l'Annuaire d'UEA)	825	8,25
MEMBRO ABONANTO (reçoit « Esperanto » et Annuaire)	1.650	16,50
(La kotizoj de junuloj ĝis 21 jaroj* estas respektive **415** kaj **825 F, 4,15 NF** kaj **8,25 NF** ; nun JMJ kaj JMA estas aŭtomate TEJO-anoj ; la pliaĝaj studentoj pagas **plenan** kotizon).		
MEMBRO SUBTENANTO	2.500	25
SIMPLA ABONO AL « ESPERANTO »	1.300	13

Les versements sont à effectuer au trésorier fédéral ou, à défaut, à l'U.E.F. Paris C.C.P. 855-35 Paris.

Les versements concernant le Groupe des Educateurs Espérantistes sont à faire à G.E.E., 6, Rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.) C.C.P. Nantes 1501-41. Membre simple : 800 F ; de soutien : 1.000 F ; bienfaiteur : 1.200 F (8, 10 et 12 NF).

* Indiquer la date de naissance ; ** indiquer la Faculté.

SOMMAIRE

— Tous ensemble pour la campagne scolaire, par A. RIBOT 71
— La 45-a Universala Kongreso de Esperanto en Bruselo 73
— La Olimpiaj Ludoj de JULIETA 74
— Ecole d'été 1960 du G.E.E. — Mondaj Eĥoj 76
— Pour des échanges internationaux « à la base » 78
— Vivo de la Grupoj kaj Federacioj 80
— Recenzoj 82
— Tekstoj de Zamenhof, de P. CILIGA 83
— Libera tribuno : Unu el la nepraj devoj de ĉiu esperantisto, de L. BELHOSTE 84
— « La Voĉo de Ameriko » 85
— Le stage de l'U.E.F. au château de Grésillon 86

TOUS ENSEMBLE POUR LA CAMPAGNE SCOLAIRE

Les lecteurs de la revue ESPERANTO, organe officiel de l'U.E.A. ont pu lire, avec satisfaction, les deux articles signés du Professeur LAPENNA, et annonçant la campagne à laquelle tous, — SANS EXCEPTION — nous sommes conviés : la campagne en vue de l'introduction de la langue internationale dans les programmes scolaires du monde entier.

En outre, le Comité exécutif de l'UNESCO, au cours de sa session de février dernier, a inclus le Docteur ZAMENHOF dans la liste des célébrités mondiales qu'il convient de fêter cette année, d'une manière officielle, au titre du 100e anniversaire de leur naissance. Dans le domaine de la radio, la plupart de nos journaux ont publié l'initiative de « La Voix de l'Amérique ». Tout cela est le résultat d'une évolution manifeste en faveur de l'espéranto et annonce un climat nouveau, singulièrement propice pour notre action sur le plan scolaire.

A l'appel du Prof. LAPENNA, plusieurs pays ont déjà commencé à agir. En France, comment se présente la question et que pouvons-nous faire ? Un premier pas est déjà en voie de réalisation : c'est la formation d'une Commission de quatre membres, deux appartenant au G.E.E. et les deux autres à l'U.E.F. C'est au Congrès de Montélimar que seront vraisemblablement connus les noms des membres de cette Commission qui, dès avant les vacances d'été, aura à examiner les faits sous leur aspect actuel et à établir un plan pour octobre.

En attendant, le travail ne manque pas pour tous les espérantistes, quels qu'ils soient ; il s'agit surtout d'un énorme travail d'information du public et plus particulièrement des Membres de l'Enseignement et des Parents d'Elèves, premiers intéressés. Il faut, avant tout, bien mettre en relief, l'intérêt que présente l'espéranto pour la culture et l'enseignement des autres langues. Il faut aussi préciser chaque fois que cela sera possible, la position des espérantistes français devant l'introduction de l'espéranto dans les programmes scolaires : étant donné qu'en France, l'étude d'aucune langue n'est obligatoire, nous demandons pour l'espéranto, une épreuve facultative seule capable de satisfaire les adversaires de la langue internationale, puisqu'ils ne seront pas obligés de la subir.

Tout cela soulève des problèmes et pose des questions auxquelles nous répondrons dans les bulletins à venir, avec quelques détails, afin de donner à tous une documentation solide pour les discussions à venir. Que ceux d'entre vous qui auraient des suggestions à présenter ou des conseils à demander, n'hésitent pas à écrire au signataire de ces lignes qui se fera un plaisir d'y répondre dès que possible. Dès maintenant, que les groupes et les isolés se considèrent responsables de l'information espérantiste dans leur ville ou leur région ; qu'ils envisagent, sans plus tarder, l'insertion de courts communiqués (gratuits) dans la presse, ainsi que l'envoi d'une succincte documentation aux principaux membres de l'enseignement exerçant dans leur ville : ce n'est que par cette action généralisée et répétée que nous arriverons à montrer à tous ce que sont véritablement l'espéranto et les éminents services qu'il peut rendre à notre monde actuel.

Dès le prochain numéro de Franca Esperantisto, nous ouvrirons une rubrique « POUR LA CAMPAGNE SCOLAIRE » où nous donnerons le compte rendu des activités de chacun, dans le domaine que nous venons d'évoquer. Donc, tous à l'œuvre !

A. RIBOT.

Les Editions Françaises d'Espéranto viennent d'éditer deux prospectus de 4 pages 21 × 27 ayant pour titres :

L'ESPERANTO ET LA CULTURE, par Mlle DEDIEU, Professeur d'espagnol au lycée Berthelot à Toulouse.

L'ESPERANTO DANS L'ENSEIGNEMENT, par André RIBOT.

On peut se les procurer aux E.F.E., rue Paul-Vergnes, MARMANDE, aux conditions suivantes :

2 exemplaires (franco) :		0,30
10	» »	1,25
20	» »	2,45
50	» »	6,00
100	» »	12,00

Versement du montant, à la commande : C.C.P. 30-900 Bordeaux.

INTERNACIA KORESPONDOSERVO

Bonvolu sendi viajn korespondopetojn kiel eble plej frue, ĉar la servo ne funkcios dum la tuta monato aŭgusto.

Sekvu ĉiam zorge la regulon de la servo kaj precipe ne forgesu indiki vian aĝon : tio estas la plej grava punkto.

Se vi havas tro da korespondantoj, sendu al mi iliajn adresojn kaj ĉiujn konatajn sciigojn : ili ege helpos min.

Kiam la pagota sumo superas 5 NF, vi povas ĝiri ĝin al mia poŝtĉekkonto Rouen 574.88.

Se ĉiu trovus unu plian abonanton por la Revuo, tio duobligus nian legantaron (problemo de ŝak-tabulo).

KUNSIDO DE LA ADMINISTRANTARO de U. E. F. en PARIZO la 26-an-3-60

Ĉefaj punktoj el la protokolo de S-ro A. RIBOT, Ĝenerala Sekretario de U.E.F.

• U.K en BRUSELO :

S-ro Pierre PETIT donas interesajn novaĵojn pri la peraŭtobusa karavano : alloga vojaĝo !

• KUNLABORADO KUN G.E.E. :

Sekve de la rezolucio de U.E.A. organizi kampanjon tutmondan por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn, estas aranĝata kunlaborado kun G.E.E. : tiucele S-ro A. RIBOT ĉeestos en TOULOUSE la kongreson de G.E.E., kiel delegito de U.E.F. ; estas antaŭvidita komisiono komuna al ambaŭ asocioj, por prizorgi la rezolucion.

• POPOLUNIVERSITATOJ :

La venonta kongreso okazos en Strasburgo, kie S-ro PETIT projektas oficialan intervenon favore al Esperanto.

• ZAMENHOF-JARO :

Sekve de la gravega decido de la Plenumkomitato de UNESKO ; U.E.A. decidis, ke la Zamenhof-jaro daŭros dum 1960. Ĉiuj asocioj kaj grupoj estas petataj daŭrigi sian agadon tiurilate.

• « FRANCA ESPERANTISTO » :

La nuna formo estas laŭdata de ĉiuj ; bedaŭrinde ĝi kostas tre multekoste al U.E.F. ; bonega solvo estus ke ĉiu abonanto varbu plian abonanton. S-ro J. THIERRY, la redaktoro, gratulita de la Administrantaro, klopodos estonte reguligi la aperadon.

• FINANCOJ :

S-ro ROUSSEAU donas ciferojn kaj klarigojn pri la diversaj en- kaj elspezoj : la ekvilibro estas firmigita.

• NACIA KONGRESO :

S-ro LLORENS klopodegas por tute elstara organizo de la Franca Kongreso en MONTELIMAR, al kiu jam aliĝis pli ol ĉent kvindek gesamideanoj. Ĉi-jare Prof. D-ro G. CANUTO partoprenos la kongreson.

• OFICIALA REPREZENTANTO :

S-ro A. RIBOT proponas, ke U.E.F. petu de la Ministerio pri Nacia Klerigado la sendon de oficiala observanto al la Brusela U.K. Aprobita.

• TEATRA AKTORARO :

La Fervojista Asocio transsendis al U.E.F. leteron de jugoslava teatra aktoraro pri eventuala aranĝo de rondvojaĝo en Francujo. Bedaŭrinde, pro financaj motivoj, ankoraŭ nun ne estas eble organizi tian rondvojaĝon por tiom da geaktoroj.

CONSEIL AUX DÉLÉGUÉS de GROUPE

La presse est peut-être le plus puissant moyen de propagande qui soit à notre disposition. Sachons l'utiliser au maximum. L'effort soutenu dans ce sens porte des fruits. Grâce aux articles de journaux, le grand public apprend à connaître l'espéranto et ses possibilités. Et il se crée ainsi une atmosphère favorable autour de notre action, qui nous permettra de vaincre l'indifférence des uns, l'hostilité des autres.

Au cours de l'année 1959, nous avons reçu environ deux cents coupures de journaux, communiqués de groupes, compte-rendus de réunions espérantistes, articles d'information.

Nous sommes certains que si les groupes prenaient soin de nous communiquer tous les articles qui viennent à leur connaissance, ce n'est pas deux cents que nous pourrions enregistrer au cours d'une année, mais au moins le double, et même davantage.

Envoyez donc, dès leur parution, les articles traitant de la Langue Internationale (favorables ou non) au responsable de cette rubrique :

Sinjoro E. MOTILLON 10, Place du 8 Mai — TOURS (I-&-L.).

Inutile d'envoyer le journal entier ; il suffit d'envoyer la page en signalant l'article au crayon de couleur, sous bande affranchie à 0,05 NF.



F.E. (Avril-Mai 1960)

Dons :	N.F.
S-ro EPSZTEIN	50, »
S-ro SUBRENAT	2, »
S-ro BELHOSTE	5, »
F-ino BOITON	2,50
S-ro THILLAIS	0,50
S-ro JACQUOT	0,50
S-ro LEFEBVRE (Le Mans)	1, »
S-ro BOUCHER	0,50
Grupo Montpellier	10, »
S-ro JÉROME	0,50
S-ro MARTIN (Rennes)	3,75

Membres Bienfaiteurs :

S-ro SAGET.
Grupo RENAULT.
S-ro GAILLARD.
S-ro GICQUEL.
S-ro ROBETTE.
S-ro PENOT.
S-ro SURMONT..
S-ro BOUCHER.

45-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bruselo (Belgujo) 30 julio - 6 aŭgusto 1960
Alta protektanto : L.M. Baŭdueno, reĝo de la belgoj.

Oficiala Antaŭkongreso : Arnhem (Nederlando) 27-30 julio 1960. Adreso : Pontanuslaan 7, Arnhem.

16-a Internacia Junulara Kongreso : Rotterdam (Nederlando) 23-30 julio 1960. Adreso : Eendrachtsweg 7, Rotterdam.

NOVAJ FAKKUNVENOJ : Mendis fakkunvenon :

— Popoluniversitatoj : « La 3-a Internacia Kongreso de la Popoluniversitatoj ». Adreso : S-ro P. Petit, 26, rue de Rochebrune, Rosny-sous-Bois (Seine), Francujo.

— Mondpaca Esperantista Movado : « Esperanto kaj la praktika laboro por la paco socia kaj internacia ». Adreso : S-ro Balague, 26, Traiseng., St. Pölten, Aŭstrujo.

— Internacia Societo de Arkitektoj kaj Konstruistoj Esperantistaj. Adreso : Inĝ. K. Tyminski, Gornoslaska 45, V, 24, Varsovio, Pollando.

— Internacia Komitato de Esperantistaj Virinoj. Adreso : Virina Fako de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro, Budapest 4, Pf 147, Hungarujo:

— Eldonistoj kaj redaktoroj de Esperanto-gazetoj. Adreso : S-ro M. Jaumotte, de Bruylaan 44, Wilrijk, Belgujo.

— Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio. Adreso : S-ro O. Thormodsen, Box 132, Haugesund, Norvegujo.

— Societo de Gefratoj : « La fino — au nova komenco ? ». Adreso : Societo de Gefratoj, Bromdon, Bridgnorth, Shropshire, Britujo.

— Iniciata Komitato de Internacia Elektrista Asocio : « Problemo de la plej bona formo de elektraj maŝinoj ». Adreso : Prof. H.S. Kozlowski, ul. Baluckiego 20 m. 8, Varsovio, Pollando.

— La Esperantista Spiritista Societo : « Esperanto kaj psika esploro ». Adreso : H.W. Holmes, 38, Fillebrook Road, London E. 11, Britujo.

— Kvakera Esperantista Societo. Adreso : J. Saunders, Sydney Lodge, Bath Rd., Ventnor I W, Britujo.

— Rotario Internacia. Adreso : S-ro Maurice Lewin, 33 Kingscroft Ave., Dunstable 674, Britujo.

— Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio. Adreso : D-ro Rudolf Klimek, ul. Braterska 18, Pollando.

— Budhana Ligo Esperantista. Adreso : S-ro M. Bury, Poŝtkesto 89, Lieĝo I, Belgujo.

KATOLIKA DISERVO : La katolika diservo okazos en la Preĝejo S. Gudulo. Pastro Edmond Rohen predikos pri « La Universala tasko de la Eklezio ».

TEATRA VESPERO : La Internacia Arta Teatro gvidata de S-ro S. Flego ludos en Esperanto por la kongresanoj la triaktan komedion de Goldoni « Kurioza okazajo ».

SOMERA UNIVERSITATO : La Estraro de U.E.A. dum sia Paska kunsido akceptis jenan programon por Bruselo de la Internacia Somera Universitato :

1. « Internacijuraj problemoj de spacveturado » de Prof. D-ro Ivo Lapenna.
2. « Juraj problemoj pri atoma energio » de Prof. D-ro Marcel Roost.
3. « La eŭropa angilo tute ne frajas ! » de Kuratoro C. Stop-Bowitz.
4. « La belga literaturo, vidata el Francujo » de Prof. Gaston Waringhien.
5. « Toponimio aŭ studo de loknomoj » de Prof. D-ro W.E. Collinson.
6. « Rilatoj inter Kanariaj Insuloj kaj Flandrujo » de D-ro Juan Régulo Pérez.
7. « Jogo, Filozofio, celo kaj praktiko » de Lic. Tibor Sekelj.
8. « Esperantaj kantoj kaj ilia komponado » de Frank Merrick, F.R.C.M.

UNUAJ LABOROJ : La Internacia Infana Kongreseto kaj la Somera Universitato estos malfermitaj jam sabaton posttagmeze, la 30-an de julio 1960.

AKCEPTO DE LA ALVENINTOJ : La akcepto de la kongresanoj je alveno en Bruselo estos zorgata nur en la Centra Stacidomo, kie en la unuaj tagoj funkcios konstanta akceptejo.

FERVOJA RABATO : La 25 % rabato de la belgaj fervojoj estas valida de kvin tagoj antaŭ la Kongreso ĝis kvin tagoj post ĝia fermo. La rabato estas ricevebla je prezento de la speciala rabatkarto, sendita al ĉiu partoprenonto kun la Dua Bulteno, sur kiun karton la kongresano devas nepre aldoni sian nomon kaj adreson (1).

KONGRESA GAZETARA SERVO : La Loka Kongresa Komitato elektis kiel redaktoron de la dumkongresaj esperantlingvaj bultenoj de la Gazetara Servo S-ron M. Gijvoje el Ljubljana.

MUZIKA VESPERO : En la kadro de la Muzika Vespero la 60-persona Ĥoro de Esperanto-Filmo-Germanujo prezentos programon de diverslandaj popolaj kantoj

LASTA ALIĜDATO : La Loka Kongresa Komitato akceptos aliĝojn por la Universala Kongreso nur ĝis la **30-a de junio 1960.** La lasta limdato por mendi kaj antaŭpagi ĉe L.K.K. loĝadon kaj ekskursojn estas same la **30-an de junio 1960.** Post tiu dato la Kongresa Komitato ne garantias loĝigon por la malfruintoj.

STATISTIKO : (ĝis fino de aprilo) entute 1465 kongresanoj.

G. C. Fighiera,
Konstanta Kongresa Sekretario.

---

(1) Por la francaj fervojoj peti la rabatilon de U.E.F.

UNU HINDEŬROPA TRADICIO :

La Olimpiaj Ludoj

Dum la jaro 1960 Romo, la Urbo Eterna, akceptos la konkuradon de la Olimpiaj Ludoj.

Tiuj ĉi ludoj revivigas tre antikvan tradicion, laŭ kiu ili devenas de la « Oraĝa » pratempo, kiam la dioj mem ilin partoprenis : Apolono en la kur-konkuro venkis Hermeson ; Pelopso, la filo de Tantalo, en la ĉar-konkuro venkis Oenomaoson, la reĝon de Elido, kies bildo, por ĉiam famigita, estas ankoraŭ nun videbla sur la templa frontono de Olimpio ; tie ankaŭ Aŭgio estis venkita de Heraklo, kiu ricevis la premion de la Unuaj Ludoj...

★

Ĉe la helenoj la ludoj estis tre honoratigitaj kaj multaj ; la Pitiaj Ludoj en Delfo, la Numeaj en Argoso, la Istmaj en Korinto.

★

Sed baldaŭ la helenaj sportkonkuradoj en Olimpio super egis el la ceteraj. Tial ekde la 9-a jarcento antaŭ J.K. la reĝo Ifitoso oficialigis ilin, kaj tiuokaze altrudis sanktan interpacon, kiu ebligis kvietan disvolviĝadon de la konkuradoj : ĉiuj popoloj de Peloponezo solene interkonsentis pri la proklamo de la « teritorio de Olimpio » kiel de neŭtrala ŝtato. Dum la festoj ne estis permesita al iu ajn armita grupo penetri tien ; kaj de post la proklamo la loka festo iĝis nacia.

Ĉe la kunfluo de l'Alfeo kaj de la Kladeoso, malsupre de arbara deklivo de la Monto « Kronion », staris la fama templo de Olimpio (mirindaj restaĵoj) ; kaj apude, meze de la ebenaĵo, la ne malpli fama verko de Fidio, la marmora statuo de Zeŭso, kiu dek-kvar metrojn alta prezidis la ludojn.

La sukceson kaŭzis ĉefe la situo mem de Olimpio : la ebenaĵo estas ja ŝirmita per amasoj de nigretaj pinoj, starantaj sur montetaj deklivoj ; la valetoj estas agrable ombritaj de arĝentaj poploj kaj platanoj ; la vinberejoj agordas siajn kolorojn kun tiuj de la mirtoj kaj olivarboj ; kompare kun la Atika marbordo, milde kuŝas Olimpio en verdanta pejzaĝo tute plena de dolĉeco.

★

Honore al Zeŭso tiuj ĉi ludoj okazis ĉiun kvaran jaron, kaj de tiam la grekaj olimpiadoj iĝis la bazo de la internacia komputo.

Rajtigitaj en tiuj ludoj estis nur la grekaj atletoj, kiuj pruvis puran devenon de la helena raso. Se la kandidato havis konsciencon senriproĉan, kaj vivis pace kun la dioj kaj homoj, li tiam povis iri al Eliso por sin prepari dum tridek-taga instrua provtempo. Poste sekvis antaŭaj, kvazaŭ eliminaj, ekzamenoj, kiuj servis por disvidi la konkurantojn en diversajn kategoriojn.

Ĉe la Unuaj Olimpiaj Ludoj nur la kur-konkurado kunhavis unu premion : ĉu pri rapideco, ĉu pri rezisto-kapablo ? En la jaro 776 antaŭ J.K., la greka atleto Koroeboso brilege sukcesis la unuan venkon.

Post kelkaj jaroj estis aldonita la luktado, t.e. : pankraco kaj pugnobatalo ; en ĉi lasta la konkurantoj havis la pugnojn surmetitaj per plumbitaj rimenoj, la cestoj, kaj ili interbatalis, ĝis unu konfesos malvenkon.

Forpasis ankoraŭ kelkaj olimpiadoj, kaj organizita estis la « pentathle », nome la kuniĝo de kvin provoj : kur-konkurado, diskoĵetado, lancoĵetado, saltado, kaj luktado. Sed de post la jaro 490 antaŭ J.K. la provo, kiu ĉiam estigis ĉies entuziasmiĝon, estis la kur-konkurado, pro memoro al la fama soldato de « Marathon ».

Jen, mallonge, la rakonto : la 12-an de septembro (490 a J.K.) okazis kontraŭ Persujo decidiĝa batalo, kiun gajnis « Miltiades », la atena generalo ; tiumaniere li devis savi la tutan grekan civitaron. Por anonci tiel bonan novaĵon unu soldato estis forsendita ĝis Ateno, kaj ĉar tre ekscitata estis la urbo, tiu soldato devis ĝin atingi kiel eble plej rapide. Tiel rapide li ja faris, ke senpira kaj senforta li falis ĉe la alveno mortanta : li estis postulinta de sia koro sangocirkulan kvanton superan al ĝia pumpokapabloj ! La moderna « Marathon » trakuras la saman distancon : kvardek-du kilometrojn de « Marathon » ĝis Ateno.

★

Tiel ĉiun kvaran jaron je la tempo de la plenluno, sekvanta la someran solsticon, daŭris la olimpiaj ludoj dum kvin plenaj tagoj.

Ĉe la malfermo estis solena omaĝo pro honoro al ĉiuj dioj, kun sanga oferdono al Zeŭso ; samtempe aŭdiĝis himnaj kantadoj, dum pleniĝis la aero je incensaĵoj. 40.000 sidajn spektantojn entenis la stadio, 211 metrojn longa kaj 32 metrojn larĝa. La oficiala procesio enmarŝis kun sonorado de fanfaroj ; la konkurantoj demetis la vestojn kaj post lasta oferdono al la destino-estro komencis la ludojn.

La kvina tago estis dediĉita al la proklamado de la premiitoj kaj al la distribuado de la rekompencoj, kies simpleco estis plej granda : unu krono el olivarbaj folioj kaj unu palmobranĉo. Kompense la olimpia ĉampiono,

reveninte al sia urbo ricevis multajn avantaĝojn : inter-alie li estis liberigita de ĉiaj impoŝtoj, li senpage manĝis ĉe Pritaneo kaj honoran lokon okupis en teatro, eĉ oni ankaŭ pagis al li porvivan renton... Antaŭ ol forlasi Olimpion ĉiu venkinto starigis sian statuon en la sankta ĉirkaŭaĵo : kio baldaŭ kreis veran popolon de statuoj.

Fine de la ludoj en silenton reglitadis la Sankta Urbo kaj ties neŭtrala teritorio dum kvar jaroj : en la soleco de Altiso (sanktejo de Zeŭso) ĉe la lasitaj altaroj nur la pastroj daŭrigis la oferdonojn ; intertempe multaj religiaj festoj tamen altiris la popolojn sur la apudajn bordojn de la rivero Alfeo.

★

Sed, en 384 p.k. la imperiestro Teodozo aboliciis la ludojn...

La barono Pierre de Courbertin, franca nobelo, provis unuafoje en 1880 interesigi la amikojn de la sportoj pri la ideo « revivigi la antikvajn ludojn en Olimpio » (pli ol dudek-kvin-jarcenta tradicio) !

La unuaj olimpiaj ludoj modernaj okazis en 1896 sur la greka tero, kompreneble en Ateno : la stadio estis plejparte farita el la marmoro de la vunditaj ĉampion-statuoj en Olimpio. Post la sukceso de la unua provado, la ludoj okazis en plej diversaj ĉefurboj tra la mondo.

La dek-unuaj Olimpikoj, okazintaj en Berlino, estis la lastaj antaŭ la Dua Mondmilito : la dek-duaj kaj la dek-triaj ne povis esti ludataj ; la dek-kvaraj en 1948 brilis en Londono.

Okaze de sia sepdeka naskiĝtago Pierre de Courbertin ricevis diversajn honoraĵojn de la tuta mondo ; li mortis post la dek-unuaj Olimpikoj, la 2-an de septembro 1937 : se lia funebra ceremonio okazis en la katedralo « Notre-Dame de Paris », lia koro en urno kuŝas en Olimpio ĉe la loko mem de la unua Olimpia Venko en 776 a. J.K.

★

Por la Olimpiaj Ludoj estis farita beleta, eleganta standardo : sur ĝia blanka ŝtofo interplektiĝas kvin ringoj kun apartaj koloroj, kiuj simbolas la kvin kontinentojn : blua, verda, flava, nigra, ruĝa ; la standardo el brodita sateno estas ja donaco de la Belga Komitato en 1920.

Inter du Olimpikoj ĝin konservas la ĉefurbo de la lando, kiu akceptis la lastan kunvenon. Tial de post 1936 la standardo estis konservata en Berlino, en la keloj de la « Reichbank », ĝis 1945, kiam la angloj tie ĝin malkaŝis.

★

Ĉe la solena malfermo de la modernaj ludoj kun granda honoro oni ricevas la torĉon lumigitan per la flamo mem de la Olimpia monumento, kiu torĉo lumadas dum la tuta daŭro de la ludoj.

Ĉe la fino de la lasta tago la orkestro ludas tri himnojn : la unua estas greka, memore al Olimpio ; la dua apartenas al la gastanta lando ; kaj la tria al la invitanta lando. Poste, la orkestro ekludas la propran olimpian himnon, kaj ĉiuj konkurantoj siavice iradas la stadion por la lasta fojo ; dume en Olimpio mem la monumento (kie kuŝas la koro de Pierre de Coubertin) estas iom post iom mallumigita... por kvar jaroj.

★

Ĉi-jare venis la vico de ROMO...

Ĉu oni bezonas priskribi tian urbon ? Pri ĝi ĉiuj tra la mondo verŝajne aŭdis pli malpli : tiel fama, tiel granda urbo ĝi estas, ke jam ekde 380 a. J.K. pri ĝi parolis Izokrato, akcentanta la neceson « starigi urbojn en aziaj regionoj por tie amasigi la tro multajn mizerulojn kaj vagulojn, kiuj traembarasas la stratojn de la grandaj civitoj, kaj povas perturbi ties pacon... (*) ».

Ĉu io nova sub la suno ? konkludus Salomono.

kompilis Julieta.

(*) el « Aleksandro la Granda » de Radet, 1931 (Archives Nationales).

ITALIE.

On vient de publier un dépliant pour les automobilistes, comprenant le règlement du trafic sur les autoroutes en diverses langues parmi lesquelles l'Espéranto. Initiative louable qui ne peut qu'être utile aux visiteurs étrangers du pays.

★

38a INTERNACIA FOIRO DE PADOVA

De la 29a de majo ĝis la 13a de junio 1960, en areo de 102.000 kv. metroj, okazos 38a Foiro de Padova, kun partopreno de ĉ. 3.500 aliĝintoj el kiuj pli ol mil eksterlandaj Firmaj.

El antikva « Foiro de S. Antonio » (1257) naskiĝis nuna Internacia Foiro (1919) kiu, pro geografia kaj ekonomia situo, evidentiĝas kiel tre favora merkato speciale rilate al centro-orientaj eŭropaj landoj kaj al landoj de Meza-Oriento kaj Danub-baseno.

Krom ĝeneralaj industriaj, meĥanikaj, agrokulturaj varoj estas speciale pritraktataj en la Foiro : Enpakigo Malvarmigo — En-uzinaj transportiloj — Koloro kaj Farboj — Plastikaj materialoj — Urbaj servoj ; pri tiuj specialaĵoj oni aranĝos kunvenojn kaj internaciajn kongresojn kun apartaj studoj kaj elprovoj k.t.p...

Nune tute favoraj cirkonstancoj, eme al venko de politikaj baroj kaj al fortigo de ekonomiaj fortoj, ebligas kaj invitas industriajn kaj komercajn interesulojn al partopreno kaj vizito de Foiro de Padova, kies Inform-Oficejo plezure donos ĉiujn sciigojn.

G. E. E.

Ecole d'été 1960

7 au 28 juillet 1960

7 juillet : Arrivée des participants.
8 juillet : Début des cours.
27 juillet : Examens (facultatifs).
28 juillet : Départ des participants.

Possibilité de prolonger son séjour pendant la quinzaine internationale (4 au 18 août) après accord.

Pavillon de l'Espéranto, Moulin de Piot, Chéniers (Creuse), tél. 20, à Chéniers.

(Le Moulin de Piot est à 10 minutes de marche du bourg de Chéniers).

Activités :

Matin. — Cours d'Initiation : but : donner les premiers éléments de la langue, permettre de lire un texte simple, de participer à une conversation simple.

Cours de conversation : but : amener à une utilisation aisée de la langue.

Après-midi. — Repos, distractions : pêche, baignade surveillée, canotage, jeux et sports de plein air, promenades dans une région pittoresque, excursions (Crozant, Barrage et lac d'Eguzon, Aubusson...).

Soirée. — Chant, cinéma, projection de vues fixes, causeries, jeux, conversations...

Hébergement :

Diverses possibilités :

— sous tente personnelle, propriété du campeur.
— sous tente collective (10 places), pourvue de lits et matelas type pension. Apporter draps et couvertures (nuits fraîches).
— en chambre à Chéniers, dans la Maison de Retraite des Artisans, dans la mesure des places disponibles (chambres de 2, 4, lits ; apporter draps et couvertures), chez l'habitant ou en hôtel ; ou à Bonnat à 10 km.

Repas : Par ses propres moyens pour les campeurs :

— Au Moulin des Apprentis ; grande salle à manger bien aménagée.
— Au restaurant, à Chéniers ou à Bonnat.

Prix : Pension complète, avec ou sans logement sous tente personnelle ou collective : 8 NF par jour.

Supplément pour chambre à la Maison de Retraite des Artisans : 2 NF par lit.

Pour chambre chez l'habitant : prix à débattre. S'y prendre assez tôt. Nous écrire ainsi que pour le logement en hôtel.

Droit d'inscription et assurance : 12 NF.

Ces prix comprennent la participation gratuite à une excursion collective, une seconde pouvant être organisée selon le désir des participants.

Pour *renseignements complémentaires* (moyens d'accès notamment), et *inscriptions :* G.E.E., 6, rue de la Paix, BAUGÉ (M.-et-L.), C.C.P. Nantes 1501-41.

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ FOTO-FILMAMATOROJ, — konsistanta el foto kaj filmamatoroj el tridekses nacioj, — alvokas je aliĝo ĉiujn Esperantistojn, kiuj okupadas sin pri fotografado kaj filmado, kaj petas ilin akcepti la celadojn kaj programon de « I.L.E.F. », — kaj partopreni la laboron de la foto-filmamatora internacia ligo.

Internacia Komitato de « INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ FOTO-FILMAMATOROJ ». — Adreso de sekretario : ESPERANTO I.E.E.F. Budapest 119. Poŝtkesto 6. — S-ro Arpad G. POLOSKEY — Fakdelegito de U.E.A.



MEMORIGA POŜTMARKO EN BRAZILO

Centjaro de Zamenhof

La poŝtmarko, kiun laŭ peto de Brazila Esperanto-Ligo, eldonis la Departemento de Poŝtoj kaj Telegrafoj de Brazilo memorige al la centjaro de Zamenhor ekaperis en la tuta lando la 10-an de marto de la kuranta jaro.

Bela arta laboraĵo, presita en la Brazila Monfabrikejo laŭ desegno de kompetenta fakulo, la poŝtmarko prezentas portreton de la aŭtoro de la Lingvo Internacia. Ĝia koloro estas verda kaj ĝia valoro (Cr$6,50).

La eldonnombro estas 6.000.000, kaj la poŝtmarko estas atendata de filatelistoj kaj esperantistoj kun granda intereso.

En Brazilo ĉi tiu estas la sepa poŝtmarko rilata al la Lingvo Internacia, kaj tio metas la landon en elstaran pozicion sur tiu kampo. La antaŭaj Brazilaj poŝtmarkoj estis :

1935 -8-a Internacia Specimena Foiro, Rio de Janeiro
Cr.$0,20 200.000 ekz.

1936 -9-a Internacia Specimena Foiro, Rio de Janeiro
Cr$0,20 300.000 ekz.

1937 -9-a Brazila Kongreso de Esperanto, Rio de Jan.
Cr$0,30 500.000 ekz.

1937 -Jubileo de Esperanto, Rio de Janeiro
Cr$0,30 500.000 ekz.

1945 -10-a Brazila Kongreso de Esperanto, Rio de J.
Cr$0,40 1.000.000 ekz.

1945 -10-a Brazila Kongreso de Esperanto, Rio de J.
Cr$1,20 1.000.000 ekz.

Oni povas rememorigi, ke Brazilo estas la lando, kiu unue rekonis Esperanton kiel klaran lingvon por la enlanda telegrafado (1906).



Deziras korespondi letere aŭ sonbende pri ĉiaj ĉiutagaj aferoj kaj temoj kun franca esperantisto S-ro H. Joh. HORTSMAN « De Wilgenhorst », Olst, Nederlando.



MONDA EĤOJ...

3a UNIVERSALA KONGRESO DE LA POPOLAJ UNIVERSITATOJ EN STRASBOURG

la 9-12 septembro 1960

La 3-a Universala Kongreso de la Popolaj Universitatoj okazos en Strasburgo de la 9-a ĝis la 12-a de septembro 1960 en la Palaco de la Universitato

La Organiza Komitato de tiu konferenco enhavas du esperantistojn : S-ro P. PETIT, prezidanto de la Eŭropaj Popoluniversitatoj, komitatano de UEA, vicprezidanto de la Organiza Komitato, kaj S-ro Hubert FEREZ, helpĝenerala sekretario de tiu komitato.

Plej gravaj personoj de la Universitataj medioj kaj de la Eŭropa Konsilantaro partoprenas la organizan komitaton.

Esperanto estos unu el la oficialaj lingvoj por la preparo de la konferenco. En la du antaŭaj konferencoj, Esperanto estis la nura traduklingvo. Povus okazi same en Strasburgo, kondiĉe ke, kiel eble, plej multe da delegitoj sciipovu Esperanton.

Tiucele ni rekomendas al la esperantistoj, kiuj havas rilatojn kun la Popoluniversitatoj, ke ili petu de ili la reprezentiĝon en Strasburgo.

Pri detaloj skribu al S-ro Hubert FEREZ, helĝenerala sekretario de la Organiza Komitato de la 3-a Universala Kongreso de la Popoluniversitatoj, 9, place de l'Université, STRASBOURG (Bas-Rhin).



NIAJ LOURDES'aj SAMIDEANOJ FUNEBRAS

S-ino LE BONDIDIER, Prezidantino de la Lourdes'a esperantista grupo ĵus mortis, post longa kaj peniga malsano. Krom la grandvalora kaj neforgesebla laborego, plenumita de ŝi kaj ŝia Edzo, ĉe la Muzeo-Fortikaĵo de Lourdes, S-ino LE BONDIDIER antaŭ multaj jaroj ekkonis Esperanton kaj tuj komprenis la grandan utilebleco n de tiu lingvo en tia speciala urbo, kia Lourdes. Sub ŝia klera gvidado fondiĝis do la tiea grupo kaj okazis pluraj regionaj kaj internaciaj katolikaj kongresoj, en kiuj ŝi partoprenis efektive, al ĉiuj montrante la ekzemplon de ŝia kor- kaj spiritjuneco.

Antaŭ ŝia memoro, ni povas nur esprimi nian plej elkoran deziron, ke ŝiaj gekunuloj ne permesu la malaperon de la fruktoj, kiujn ŝi kreskigis sur la esperantista grundo kaj baldaŭ en Lourdes, vere ekfloru nia internacia lingvo. Tio, certe, estos la plej digna maniero memori pri la grandkora Sinjorino LE BONDIDIER.

SVISLANDO vokas vin denove !

De la 20-a ĝis la 26-a de junio 1960, al partopreno de la INTERNACIA FERIO-SEMAJNO.

Dum la plej bela somera sezono ĝi okazos. Vi ekskursos sur la JURAO (montaro), tra la altebenaĵo svisa kaj en la koron de la Berna OBERLANDO (juvelo de la Alpoj). Kasteloj malnovaj, romanaj ruinoj, famaj pentraĵoj kaj skulptaĵoj en mezepokaj monaĥejoj same kiel novaj kaj malnovaj svisaj urbetoj estos esplorataj.

Elektraj fervojoj, vapor- kaj motorŝipoj alterne kun aŭtobusoj, ja eĉ dentradfervojo transportos VIN.

Neimageble bela estas la elvido de la *FERIO-DOMO HERZBERG !*

Bonega montar-arbara aero refreŝigos viajn plumojn. NENIA motorbruo ĝenos vin dumnokte. Nur la venteto flustros ion sekretan en viajn orelojn dum la promedadoj. Amika kunestado en la ĉambrego de la hejmo, pliagrabligata per amuzaĵoj, fariĝos neforgesebla ! Vi hejmeniros kun ĝojplenaj koroj kaj riĉigitaj per novaj amikaj rilatoj.

DO, ...NE HEZITU... aliĝu tuj ! ! !

La partoprennombro estas limigita je 65 personoj !

KONDIĈO : La semajnestro parolas esperante, france, germane kaj itale. Por alilingvanoj estas necese, ke ili estu akompanataj de Esperantisto por interpreti !

PREZO. Sv.Fr 90.-* (pagenda ĉe la alveno) por pensiono kaj ekskursoj, sed SEN la semajnfina ekskurso.
*= por 1 kaj 2-litaj ĉambroj. SV.Fr. 1- pli po nokto (je dispono po kvin ĉambroj).

La aliĝon sendu al la suba organiza adreso, kiu ankaŭ donas, se necese, pliajn informojn.

Organiza adreso : Hans HUNKELER, trajnĉefo, Girixweg 31, *AARAU* (Svislando).

Patronecas : Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj.



Germana Esperantisto, 32-jara kaj fraŭla, serĉas ian manlaboron en uzino aŭ simila. Mi ankaŭ povus transpreni germanlingvan komercan korespondadon. Proksimeco de Parizo dezirinda, sed ne devigata.

Skribu tuj al :

Erwin Schlachter, Duisburger Str. 62, Dinslaken-Ndrrh., Germanujo.



A TRAVERS LA PRESSE...

Un fait :

L'idée du jumelage des villes a été lancée par l'Association du « Monde Bilingue » qui prône la nécessité du bilinguisme pour permettre une meilleure compréhension entre les peuples. Considérant l'anglais et le français comme principaux « véhicules parlés » de la pensée humaine, le « Monde Bilingue » souhaite que chacun de ses adhérents connaisse en plus de sa langue maternelle, une des deux langues française ou anglaise.

Mais il semble que l'idée du jumelage ait pris un tel développement que le bilinguisme, lui-même, soit quelque peu dépassé. Certes, au Congrès d'AOSTE, le français a été pratiquement la langue officielle du Congrès, ne serait-ce que parce qu'il jouit d'une parité avec la langue nationale l'italien, dans le territoire autonome de la Vallée d'AOSTE, où il représente pour les Valdotains la langue maternelle.

Cependant la participation de congressistes assez nombreux des pays slaves, Union Soviétique, Bulgarie, Pologne, Tchécoslovaquie, Yougoslavie a nécessité l'emploi de traducteurs et rendu le contact direct plus difficile.

L'idée maîtresse du « Monde Bilingue » reste valable, mais la priorité donnée aux langues anglaise et française apparaît aujourd'hui comme trop limitative.

(« Témoignage Chrétien », 22 avril 1960 — article « A AOSTE, les villes se marient » de A. Vimeux).

Un problème :

SE FAIRE COMPRENDRE à BERLIN, à ROME, à MOSCOU

M. CROS recommande l'étude d'une langue vivante à l'école primaire. Pour atteindre quel but ? Culturel ou utilitaire ?

Si le but est culturel, parcourez les colonnes de la revue : c'est à qui vantera les mérites de « sa » langue, soit morte : latin, grec ; soit vivante : anglais, allemand, espagnol (en attendant arabe, russe ou chinois, cela viendra).

A quel moment, pensez-vous que les enfants de nos écoles — tous — seront assez instruits dans cette langue pour vraiment en apprécier la valeur culturelle ? Ecoutez les doléances du second degré : nos bacheliers n'y parviennent pas.

S'il est utilitaire, reconnaissez sans peine qu'en admettant qu'on réussisse à faire connaître effectivement une de ces langues vivantes, aucune d'entre elles ne peut permettre aux hommes, aux hommes des peuples (car c'est bien des peuples qu'il s'agit), de communiquer et de se comprendre. Quand un enfant aurait appris l'anglais et le saurait bien, il ne pourrait se faire comprendre ni à BERLIN, ni à ROME, ni à MOSCOU... Et on a beau chercher : aucun bilinguisme, aucun trilinguisme ne résoudra le problème de cette intercompréhension universelle !

Alors quoi ?

Eh bien ! une langue internationale qui ait à la fois une valeur de culture et une valeur utilitaire. Elle existe : c'est l'ESPERANTO.

H. LECLERCQ,
Professeur inspecteur
à l'Ecole normale, Paris.
(« Education Nationale », le 3 mars 1960).

Une opinion :

Dans un article sur l'Esperanto, M. B. Gafarov, directeur de l'Institut d'Orientation de l'Académie des Sciences de l'U.R.S.S. écrit :

« L'Espéranto est très populaire et c'est une langue très utile. Plus de 10.000 ouvrages divers sont édités en cette langue, ainsi que 112 dictionnaires totalisant 45 spécialités techniques ou scientifiques. Son étude est facile. Les racines de l'Espéranto sont romanes, germaniques et slaves ; la grammaire ne comprend que 16 règles très simples. »

(Revue HORIZONS, N° 106, Mars 1960).


POUR DES ÉCHANGES INTERNATIONAUX "A LA BASE"

Un moyen :

La « Publishing Company » vient de faire paraître un livre d'étude d'Espéranto, intitulé « Esperanto por Infanoj », destiné spécialement aux enfants et dont l'auteur est M. G. Gladstone Solomon. Ecrit directement en Espéranto, ce livre enseigne la langue en 26 chapitres de méthode directe, sous la forme de récits illustrés concernant une famille de souris.

(Revue HORIZONS, N° 106, Mars 1960).

A SPLIT, le 6 Novembre 1959



(Kliŝo afabla prentita de « Héroldo »).

Preskaŭ 13.000 - tonela transoceana ŝipo estis nomata "ZAMENHOF"

INVITO de la URBESTRO de BRUSELO

S-ro Lucien COOREMANS, urbestro de BRUSELO, sendis al la Esperantista mondo la jenan inviton, kiu estas surprenita sur la sonbendo ; tiu ĉi estas ekde nun je la dispono de la grupoj en la mondo, kiuj ŝatas propagandi la 45-an U.K., aŭdigante al siaj membroj tiun propagandan bendon : ĝi audigos al ili la voĉojn de la prezidanto de la L.K.K. (S-ro Maur. Jaumotte) de la K.K.S. (S-ro G.C. Fighiera), kiuj ankaŭ atentigas la esperantistaron pri la granda evento de tiu ĉi jaro.

★

« La Esperantistoj tra la tuta mondo rigardas nunjare al Bruselo, kiel al la ĉefurbo de la esperanto-movado.

Gastigante la kvardekkvinan Universalan Kongreson de la Internacia Lingvo, Bruselo estas fiera pri la rolo al ĝi rezervita en la kadro de la klopodoj por doni al la popoloj pacon kaj amikecon.

La historio volis, ke Bruselo — krucvojo de latina kaj ĝermana civilizoj —, gastigu popolojn el du etnikaj originoj kaj paroladantajn du diversajn lingvojn. Bru-

(Voir suite page 84)

Une réalisation :

Du lointain OUZBÉKISTAN le Cercle « ESPERANTO » a reçu documents, disques et photos pour une veillée Orient-Occident

Nous avons, il y a quelque temps, annoncé que le Cercle « Espéranto » d'Angers préparait une série de veillées culturelles en conformité avec le « projet majeur » de l'U.N.E.S.C.O. relatif à l'appréciation mutuelle des valeurs culturelles de l'Orient et de l'Occident.

Le Cercle réunira ses adhérents jeudi 28, dans une salle des cours municipaux, pour la première de ces veillées qui sera consacrée à une république soviétique musulmane de l'Asie Centrale : l'Ouzbékistan.

Pourquoi avoir choisi précisément la R.R.S. d'Ouzbékie ? C'est tout d'abord qu'il existe dans la capitale de cette république, Tachkent (à 82 heures de chemin de fer au-delà de Moscou !), des cercles espérantistes actifs, notamment celui de la Maison des scientifiques, qui se sont immédiatement déclarés prêts à fournir toute la documentation désirée et que, d'autre part, ce territoire est un pays de vieille civilisation musulmane au riche passé historique, conquis successivement par Cyrus, les Turcs, les Arabes, les hordes mongoles de Gengis-Khan. Au 14e siècle, Tamerlan fit de la ville de Samarkand, la capitale de son immense empire ; au 16e siècle, les peuplades ouzbèques occupèrent le pays qui devait être rattaché à l'Empire tsariste en 1870.

Le matériel reçu par les espérantistes angevins comprend, outre la documentation écrite qui permettra la lecture en espéranto de plusieurs textes relatifs à tous les aspects du pays, des envois effectués par la Société Ouzbèque pour les relations culturelles avec l'étranger, envois groupant une cinquantaine de photos d'exposition, des gravures et des disques de musique folklorique, populaire ou symphonique (de compositeurs actuels inconnus en Europe occidentale).

La presse de Tachkent a rendu compte de ces envois. De plus, un instituteur angevin qui visita la capitale Ouzbèque en 1956 a bien voulu prêter des diapositives.

Le mardi 24 mai, une seconde veillée aura pour titre « Une journée à Pékin » (avec documents sonores et visuels).

D'autres veillées se préparent pour la saison prochaine (le peuple Juif, les Tziganes, le Japon, l'Inde, l'Arménie, etc...).

★

Le Cercle « Espéranto » acceptera volontiers ultérieurement de prêter notamment les photos d'exposition reçues d'Ouzbékistan et de Chine à des professeurs de géographie désirant les utiliser pour leurs cours.

Il attire l'attention des éducateurs sur l'intérêt présenté par la pratique de la langue internationale espéranto et les milliers de sociétés espérantistes réparties dans le monde entier, pour des échanges scolaires de toute nature, spécialement de matériel pédagogique.

Pour tous renseignements sur les activités du Cercle « Espéranto », écrire en joignant un timbre, à M. FRANGEUL, 42, rue du Pré-Pigeon, ANGERS.

(Extrait du « Courrier de l'Ouest » d'Angers, 21 avril 1960).

" VIVO DE LA GRUPOJ KAJ FEDERACIOJ "

La Redakcio akceptas nur tajpitajn tekstojn en korekta Esperanto. Ni povas aperigi nur kliŝojn, sed NE simplajn fotojn.

FEDERACIA KONGRESO DE LA PARIZA REGIONO.

La 8-an de majo 1960 *en Versajlo!*

(kliŝo de la kovrila paĝo)

Kiuj forgesis la daton, tiuj certe bedaŭros, ĉar fakte okazis unu el la plej brilaj parizaj federaciaj kongresoj... dank' al la vigla organizanto Kolonelo A. OMONT, kaj ankaŭ... dank' al multaj partoprenantoj !

La belega vetero duobligis la plezuron iri al la reĝa urbo, tiel majesta.

Matene en salono de la urbdomo, kun la ĉeesto de la vic-urbestro, S-ro FUZELIER (kiu dediĉis al ni tutan ĉi-tagon) kaj sub la prezidanteco de Pierre PETIT, mal fermiĝis nia kongreso.

Ni aŭdis — ĉiujn interesajn — la raportojn de Aulnay-sous-Bois, Bourg-la-Reine, Cachan, Chartres, Châtenay-Malabry, Chaville, La Ferté-Gaucher, La Garenne-Colombes, Saint-Germain-en-Laye, Lepores, Maisons-Laffitte, Paris, Sèvres, Vincennes, kaj fine Versailles; kiuj raportoj montris, malgraŭ kelkaj stagnadoj, ke iom post iom, la Pariza Federacio bone revekiĝas, dank' al la klopodoj de kelkaj bonvolemuloj.

Post sia tre bona raporto pri la fakasocio de kampadistoj, kies rilatoj kun la eksterlandaj kampadistaj asocioj pli kaj pli oftiĝas, S-ro Gaston GOUGET eldiris sian deziron, ke ĉiuj fakasociaj gvidantoj kunlaboru sub la aŭspicio de UEF, tiel ke la novaj Esperantistoj trovu multajn okazojn praktiki la Lingvon Internacian.

En la lasta raporto, K-lo A. Omont klarigis, kiamaniere li agis de post pli ol unu jaro kaj fine sukcesis lernigi oficiale la Lingvon en ĉiuj unuagradaj lernejoj de Versajlo (556 gelernantoj). Lia zorgemo kaj sindonemeco estis entuziasme aklamitaj.

Tuj poste ĉirkaŭis lin por fari memorindan foton, liaj gelernantoj, multnombraj, kun siaj geinstruistoj.

Akceptis la kongresanojn en la urbdomo S-ro CADORET, unua vic-urbestro, por la honorvino; li tre elokvente parolis pri K-lo A. OMONT kiel « vera apostolo de la Lingvo ».

En fama restoracio, ĝoja tagmanĝo okazis kun 14 geinfanoj elektitaj el la plej indaj, tiel fieraj pro la honoro kunesti en tiu nekutima medio.

Rimarkindaj estis la paroladoj de S-ro JUIGNAT, lernejestro de la Porinstruista lernejo, de S-ro FUZELIER kaj de S-ro PETIT.

Poste la agrabla distra parto en saloneto de la urbdomo multe impresis la neesperantistajn ĉeestantojn. Ĉiuj programeroj estis majstre prezentitaj de S-ro J.A. ROUSSEAU, nia lerta kasisto;

— du knaboj kantis : « Frato Jako »
— du knabinoj : « ĉu vi plantas » ?

La folkloraj kanzonoj kantitaj de Ges-roj S. FLEGO kaj J. RAVSEL plezurigis ĉiujn, kvankam por infanoj kaj neesperantistoj la kvanto povis ŝajni iomete ega, kaj kaŭzi monotonecon; la plimulto multe pli ŝatis, pro mimiko, la monologon, laŭ R. Lamoureux : ili ĝoje komprenis, kiamaniere oni povas, aŭ ne, glui la paperojn...

F-ino C. SUCHAREAU agrable prezentis kelkajn poemojn.

« La Ŝtelisto » kaj « Oni komplotas » (tiu ĉi de R. SCHWARTZ) multe amuzis ĉiujn; ja, la du skeĉoj estis bonege preparitaj kaj luditaj de la FERVOJISTOJ, anoj de la grupo en « St Lazare »; kaj la ĉeestantoj trafe povis tuj kompreni kaj ekkapti la spritaĵojn de la verkistoj.

Kun plezuro ni vidas, ke Esperantistoj denove ludas teatraĵojn, kaj tiel vivigante la Lingvon Internacian, montras ĝian viglecon... Ni aplaŭdas ĉi tiun grupon ambaŭmane, kaj bondeziras al ĝi fruktoriĉan prosperon. Dankon.

JULIETA.

LES ANDELYS.

La infana klubo de Les Andelys ĝojas inviti vin al sia unua festeto, kiu okazos dimanĉon, la 12-an de junio 1960, je la 16-a, en la porknabina lernejo, 8, boulevard Néhou, Les Andelys (Eure).

Provizora programo :
— 1-a parto : lumbildoj pri Grésillon ;
vizito de la malgranda ekspozicio ;
— 2-a parto : kantoj ;
prezentado de teatraĵeto verkita de la infanoj mem : « Unu tago en esperanta familio » ;
— 3-a parto : disdono de la premioj.

Se vi ne povas partopreni, vi tamen rajtas plenigi la vojaĝkason de la plej bonaj lernantinoj. Dankon.

S-ino Vincent, instruistino, Les Andelys (Eure). C.C.P. Rouen 574.88.

LIONA ESPERANTO-SOCIETO.

En la Komitat-kunsido de la 2.marto 1960 estis elektita la jena estraro :
Veterana prezidanto : S-ro MAGE.
Aktiva prezidanto : S-ro LEVIN :
Vic-prezidantinoj : S-inoj CLAVIER kaj EYSSAUTIER.
Generala sekretariino : F-ino PERRA.
Sekretarioj : S-ro BUDIMIR, F. GALLON.
Kasistinoj : S-ino MAMAROT, F-ino GALLON.

Libroservo : Ges-roj LEMAIRE, CLAVIER.
Help-Servo : S-ino EYSSAUTIER.
Magnetofona Servo : F-ino J. PERRA.

Dum la jara ĉefkunveno nia amiko BUDIMIR esprimis bonan ideon : por ke grupo havu viglan vivon, estas necese, ke ĝi havu PRECIZAN ATINGOTAN CELON. Do li proponis, ke la celo estu : havigi al la grupo propran sidejon (kies avantaĝoj estas facile antaŭvideblaj). La Komitato reprenis ĉi tiun ideon dum sia kunsido, kaj komisiono (5-membra) estis elektita tiucele.

BRILA REGIONA KONGRESO OKAZIS EN LILLE.

La Franc-Norda Esperanto-Federacio kongresis en Lille, okaze de la unua Franca-Belga Foiro de la Komuna Merkato. Sepdek-tri delegitoj el multaj urboj de la departementoj NORD, PAS-DE-CALAIS, SOMME kunvenis en la kinejo de la internacia foiro. S-ro Marcel LESOIN, prezidanto de la loka klubo, dankis la georganizintojn kaj bonvenigis la publikon kaj la oficialulojn, t.e. S-roj BLANCHARD, urba konsilanto, kaj PICAVET, por la Foira komitato.

Salutojn sendis S-ro PHILIPPE, honora prezidanto; grupo da bulgaraj esperantistoj kaj redaktoro de « Heroldo de Esperanto ». Post la aprobo de la raportoj prezentitaj de Ges-roj R. CURNELLE kaj G. AUGUEZ, la kongresanoj elektis la jenan komitaton :

Prezidanto : G. ODENT, 19, rue des Fours, *Arras*.
Ĝenerala sekretario : BOURGOIS, 21, rue Gambetta, *Noyelles-Godault* (P.-de-C.).
Help-sekretario : G. AUGUEZ, 4, place Genevières, *Lille*.
Kasisto : DOYELLE, 9, rue de Dunkerque, *Bourbourg*.
Gazetara Servo : L. GILOTEAUX, 7, rue Saint-Saëns, *Wattrelos* (Nord).
Membroj : A. CONTART, BOUQUIN, M. LESOIN, R. MONNIER.

Krome, la ĉeestintoj aŭskultis la kongresan sonbendon de Bruselo kaj decidis helpi nian revuon FRANCA ESPERANTISTO per financa kontribuo de 100 novaj frankoj.

La federacio kreos bibliotekan fakon, kiu unue enhavos plej valorajn verkojn el nia literaturo.

Dum la amika bankedo, kie kunestis 41 gesamideanoj, S-roj LESOIN kaj PICAVET gratulis ĉiujn aktivulojn de la federacio. F-ino Michèle LEGRAND (Roubaix) kaj S-ro Guy AUGUEZ (Lille) deklamis poemojn.

Posttagmeze, dudek-du kandidatoj partoprenis elementan ekzamenon. Dek-tri junaj lernantoj ricevis specialan premion kaj la laŭreatoj estis : LIGOT Marcel. RINGOTTE Alain. LENEL Renée. GILOTEAUX Lilli. LENEL Françoise kaj LEMIRE Andrée.

La proksima regiona kunveno okazos en Bourbourg, apud Dunkerque.

BOURBOURG.

Federacia kongreso okazis dimanĉe la 22-an de majo kun la sekvanta programo :

10 h. Akcepto de la urbestro, S-ro VILAIN, kaj honorvino.
10 h. 30. Labor-kunsido.
13 h. Komuna tagmanĝo ĉe « Café des Sports ». posttagmeze, vizito de la urbo.

HENIN-LIETARD.

S-ro L. BOURGOIS gvidas elementan kurson ĉiumarde, de la 19-a ĝis la 20 h. 30, en la « laika hejmo », place Carnot.

S-roj DARCHICOURT, deputito-urbestro, kaj DEROEUX, senatano el Arras, klopodas por atribuo de subvencio al la Norda Federacio.

ROUBAIX.

S-ro Gaston L. GILMAN, delegito de U.E.A., prezentis prelegon pri nuntempa Germanujo ĉe la nova klubo « Léo-Lagrange ».

Dum alia kunsido de la asocio, S-ro Victor PROVO, urbestro, esprimis sian simpation al esperanto.

FRANC-ORIENTA ESPERANTO-FEDERACIO.

La 22-an de majo okazis en Nancy la 20-a federacia kongreso, je la 9-a 30.

Partoprenantoj sin anoncis al S-ro J. P. COLNOT, 16, avenue Déroulède, Laxou (M.-et-M.).

Strasbourg. — La grupo de Strasburgo havis depost la milito seninterrompe dufoje monate kunvenoj N. NUN, okazas la 1an kaj 3an merkredojn de ĉiu monato je la 20 h. 30 en la restoracio « Maison des Tanneurs », rue des Bains-aux-Plantes. Gi estas historia domo el la 16a jarcento kaj ofte eksterlandaj vizitas ĝin.

Japana vespero en Saint-Avold

Mankas loko por detale raporti pri tiu interesa aranĝo de S-ro MANCEAU.

En la Kinejo « Scala », preskaŭ plena, la 17an de marto, 350 personoj aplaŭdis S-inon KAĴINO en ŝia plaĉa programo pri Japanujo. La lokaj gazetoj favore anoncis kaj raportis pri la kunveno.

Sekve de tio, 27 personoj aliĝis al Esperanto kurso gvidata de S-ro MANCEAU en la liceo de Saint-Avold.

Ni diru, ke nia samideano havis la meriton prepari jam de preskaŭ unu jaro la viziton de S-ino KAĴINO en nia regiono. La evento fariĝis bela sukceso en Bar-le-Duc kaj Saint-Avold.

PROVENCA ESPERANTO-FEDERACIO.

La 24-an de aprilo okazis la 28-a datreveno de la Marsejla Grupo; la 25-an memorigo de la centjara datreveno de Valere BERNARD; kaj la 15-an de majo la 26-a federacia kongreso en Martigues.

Okazos la 12-an de junio ekzamen-sesio por la tri gradoj en la porknabina lernejo de Cours Julien (Marsejlo) — voko de la kandidatoj je la 7-a 45; kaj la 3-an de julio tuttaga kunveno en Celony, ĉe niaj gesamideanoj BERRET (Bredado St-Martin) — rendevuo je la 10-a sur la placo de la Rotonde en AIX.

RECENZOJ

La redakcio recenzigas nur duope ricevitajn librojn, ĉar 1 ekzemple-ron ricevas la biblioteko.

MARJORIE BOULTON : *EROJ*. Originala Poemaro. — Kovrilo de JOHN HARTLEY. — Portretoj de la aŭtorino. — STAFETO : BELETRO, 15. — J. RÉGULO, Eldonisto, La Laguno, Tenerifo, Kanariaj Insuloj, 1959. — 16 × 22 cm. — 368 paĝoj. — Prezo : 12 NF.

Marjorie BOULTON estas nelacigebla verkistino. De post sia grava verko « Kontralte », ŝi verkis diversajn librojn en Esperanto kaj en Angla lingvo, kaj ankaŭ faris tradukojn. « EROJ » staras en bona loko inter ŝiaj lastaj kreajoj.

Naturo dotis la poetinon per granda observemo ; tial ŝi daŭre kolektas riĉajn bildojn, kiuj, en oportuna tempo, elŝprucas el ŝia cerbo kaj ĝemiĝas en poemoj. Ŝi estas tre sentema al ĉio vivanta, al ĉio suferanta. El la homa mizero ŝi nenion preterlasas kaj, laŭ karitata inklino, ŝi avidas faciligi ĝin. Ŝia spirito estas proksima al ŝia koro. « Ŝi volas kontribui ion utilan al la socio ».

La libro grupiĝas sub diversajn titolojn, kaj laŭkaraktere, faskojn da poezioj. Sub titolo « Eroj » la verko alfrontas la problemon de la moderna vivo : Homo senĉese taŭzata per bruega « Mekanismo », premata per malhumana kaj anonima « Administracio », tia sama kiel oni vidas en « Kastelo » de KAFKA. Malesperigaj potencoj kiuj kompromitas se ne la vivon, almenaŭ la personecon kaj ofte la dignon ! Dispremado de l'homa spirito per mensogaj ideologioj, sufoka netoleremo, politikaj kaj reklamaj sloganoj ! En tiun ĉi parton relative mallongan, sed esence gravan, la poetino stampis laŭ certa denseco sian intiman penson. Ŝi prezentas poemojn filozofie kaj morale valorajn, en kiuj oni povas diveni ŝian intensan soifon al perfekteco kaj al karitato : « Redoni la homecon al homaro. — Respekti la ekziston de l'najbaro. — Libero estas iom pli ol vorto ».

Sub aliaj titoloj : « Provizore, Sur mia sanga tero... » estas retrovebla la sama gvidmotivo ekzaltanta la vivosencon ; kaj ankaŭ tiu espero, kiu signas la homojn, kiuj firme opinias, ke Belo devas ekzisti, ke Bono devas superi la humiligan kaj preman malbonon.

Kaj jen estas la esperkanto :

« Ni devas fidi, ke la viv' valoras-
per ag' de fido, jes : sed ag' necesa ;
ni devas kredi, ke iel floras,... » (XIV)

« Do, ni akceptu devon de l'espero :
Amu laŭ niaj ebloj ; en kompato
vivu, fidelu ĉiam al lumero...
ni amikigu nian fremdan Teron
fidelaj al la nekonata lumo. » (XIV)

Estas neeble silenti pri la belaj poezioj, kiuj sub la titolo « Folioj de Ora Branĉo » konsistigas la plej grandan parton de la verko. Tie abundas intimaj pensoj esprimantaj veran suferon pro nerealigebla amo. Tamen superante cian doloron, la poetino skribas :

« Mi ekkomprenis bonon nur
per mia amo ; mi superas
al karitato kaj matur'
nur ĉar mi febre amdeliras.
Jes, mian amon mi detruos
aŭ mia am' detruos min.
Mi amos ; kaj mi evoluos.
Kaj Dio zorgu pri la fin'. »

Pro manko de loko, ĉi tiu analizo estas supraja, kaj tro fragmenta. Aliaj serioj estas tre valoraj, kaj sume la tuta libro estas leginda. Estas konstatinde, ke la tekniko de la poetino pli kaj pli boniĝas, malgraŭ la vortoj skribitaj de la aŭtorino en la enkonduko : « Miaj poemoj estas la fuŝesprimoj de komunikema personeco ». Certe, poeto neniam plene sukcesas envortigi siajn pensojn kun ĉiuj nuancoj ; sed mi opinias, ke Marjorie BOULTON vere progresas al nun proksima perfekteco.

*
* *

La Stafeto-prezento estas fidela al sia kutima bela maniero. Sinjoro Régulo Pérez ankoraŭfoje meritas viglajn gratulojn.

R. LEGER.

MARJORIE BOULTON : *VIRINO ĈE LA LANDLIMO*. — La kvina pinto en la leviĝanta stelo de la KOKO-serio. — 15 originalaj dramoj kaj skeĉoj kun dediĉo al Julio Baghy, 196 p., 13 × 21 cm., en zorgita grafiko sur bona papero en delikata, helgriza bindigo. Kovrildesegno de Per Lundgreen. — Prezo : 10 NF., U.E.F., Parizo.

La Koko-Serio prezentas sian kvinan libron. Ĝi estas tre bele presita, kaj aperas en modela vesto. « Virino ĉe la landlimo » estas la unua titolo de la 17 drametoj kaj skeĉoj, konsistigantaj la libron, kies verkistino estas Marjorie BOULTON. La malesto de tiaj teatrajoj en nia literaturo instigis ŝin verki ilin. La jena eltirajo el la antaŭparolo klare informas pri la intenco de la aŭtorino.

« ... Mia dua motivo estis pedagogia. Por ellerni lingvon, oni devas multe legi ; kaj por flue paroli, estas pli utile multe laŭtlegi. Dramlegado tre helpas en kursoj, kaj la publika prezentado de dramo estas utila por tempa celo. Tial mi verkis ne nur por spertaj esperantistoj, kiuj kapablas bone ludi seriozajn dramojn, sed por timemaj gekomencantoj, kiuj povos iom forgesi siajn timojn en simplaj roloj. Ni kutime lernas multon kaj bone fiksas ĝin en la memoro, kiam ni amuziĝas pere de lingvo aŭ alia studotemo. »

En tiuj ĉi pecoj oni ĉiam retrovas la perfektan stilon de M. BOULTON, kaj ofte la ĉefajn gvidmotivojn, kiuj spinumas ŝiajn antaŭajn verkojn : forigo de la milito, akuzado al arbitra ordonpovo kaj al malhumana regado... amo al la proksimulo, toleremo, karitato... Pri tio ĉi mi jam longe skribis en la recenzo pri « Eroj ». Tiam la teatrajoj havas moraligan valoron.

La nova verko de M. Boulton pleniĝas mankon ; ĝi esperebIe estos favore akceptata de la esperantistaj rondoj, dezirantaj interesigi siajn kunvenojn.

R. LEGER.

TEKSTOJ de ZAMENHOF

mankantaj en la " Originala Verkaro "

Kolektante la tekstojn de l'iniciatoro de Esperanto, d-ro Joh. Dietterle preterlasis multajn tekstojn (plej ofte mallongajn), kiuj aperis en nia unua gazeto, « La Esperantisto ». La suplemento, kiun li estis autaŭvidinta, ĝis nun ne aperis. Tre multaj artikoletoj, evidente redakciaj, devus esti represitaj, ĉar ili tre ofte prezentas grandan intereson el vidpunktoj historia kaj ĉefe esperantologia.

Multaj « lingvaj respondoj » aperis en formo iom malsama, ol tiu trovebla en la libroforma kolekto; la letero al Borovko suferis en ĉi-lasta verko plurajn, tute arbitrajn modifojn, el kiuj ekz-e la majusklitaj popolnomoj ŝuldiĝas tre probable al de Beaufront (« Esperantaj Prozaĵoj », represitaj el « L'Espérantiste »). Ne havante sufiĉan lokon en nia franca Revuo por aperigi ĉiujn tekstojn (aŭ variantojn), mi elektas la jenan, kiu konigas la ĝustan aperjaron de « Universala Vortaro » :

« En la fino de Aŭgusto eliris jam el la presejo la multajn fojojn demandita « Universala Vortaro de la lingvo internacia Esperanto ». Tiu ĉi verko prezentas tre gravan enmeton en nian literaturon kaj forigas gravan mankon, kiu ĝis nun estis sentata sur ĉiu paŝo. Precipe niaj rusaj kaj francaj amikoj jam longe atendis tian verkon, kiu ĝis nun ekzistis nur por germanoj. Estas al ni tre agrable, ke tiu ĉi verko, post longaj malfaciloj kaj malhelpoj, fine jam ekzistas preta kaj presita. La « Universala Vortaro » prezentas la tradukon de la tuta « Meza Vortaro » (verko n-ro 21) samtempe en la lingvoj franca, angla, germana, rusa kaj pola. Nun sekve preskaŭ la tuta civilizita mondo povas jam tute libere legi la « Esperantiston » kaj ĉion alian, skribitan en Esperanto, ne renkontante tre ofte vortojn nekonatajn. Ankaŭ por ne-esperantistoj tiu ĉi seslingva kompara vortaro prezentas certan intereson. La verko kostas nur unu frankon (=40 kopekoj =80 pfenigoj). Kiel ĉiuj niaj estontaj verkoj, ĝi havas verdan kovrilon kun stelo. Ni enprenis ĝin en la « Nomaron de la verkoj » sub n-ro 64. Oni povas ĝin ricevi ĉe L. Zamenhof. »

« Esperantisto », No. 9 (45), 15a septembro 1893.

Pasintjare nia Revuo, kaj ankaŭ « Heroldo de Esperanto », aperigis forgesitajn aŭ nekonatajn Zamenhof-leterojn; s-ro Waringhien kolektis tre multajn en sia duvoluma kolekto. Tamen kelkaj restas ankoraŭ aldonendaj, ekz-e mi trovis en « Progreso », N° 14, Apr. 1909, p. 102, la jenan leteron, cititan laŭ la lasta n-ro de l'kanada revuo « La Lumo » (III jaro, n° 1 ; januaro kaj februaro 1904) : « Kara Sinjoro ! »

Estas granda domaĝo, ke la presistoj en via urbo nun ne volas plu presi tekstojn kun literoj supersignataj, sed tio ĉi ja tute ne estas tiel granda malfeliĉo, kiel vi skribas. Ni havas ja tre bone la eblon presi ankaŭ *sen* signetoj, farante tamen *nenian reformon* en la lingvo. En la gramatiko de Esperanto (vidu « Fundamenta Krestomatio », paĝo 254) estas ja *klare dirita* la jeno : presejoj, kiuj ne posedas la literojn... povas anstataŭ ili uzi : ch, gh, hh, jh, sh, u. Sekve vi povas tre bone de nun presadi « La Lumon » kaj la « Amerikan Esperantan Kolekton » sen signetoj... sed se vi dezirus presadi per alfabeto tute *reformita*, tio ĉi estus tre danĝera, danĝerega paŝo, kiu baldaŭ disfaligus nian tutan aferon.

Kun kora saluto,

L. Zamenhof. »

(*ne-datita, sed ricevita la 31-an de Dec. 1903 responde al letero de la 1-a de Dec. 1903, kies tekston oni ĵus legis*).

Rimarkoj : mi aldonis la majusklojn, kiujn tiu gazeto entute ne uzis. « La Lumon » s-ro A. Saint-Martin ne povis plu presigi pro la supersignoj, kiuj mankis en la adoptitaj « Linotip »-maŝinoj.

Sekve de tio li skribis al d-ro Zamenhof, petante rajtigon uzi la fonetikan alfabeton, tio estas la reformitan alfabeton proponitan de « La Lumo », anstataŭ la alfabeto kun supersignoj. Post la rifuza letero, kiun ni represis ĉi-supre, la kanada revuo malaperis. Nuntempe tamen oni facile presas nian lingvon en Kanado ĉe Esperanto-Press.

Post la aperigo de Zamenhofa poŝtkarto (vidu « F.E. », N° 184, Sept. 1959, p. 66), kiun komunikis al ni s-ro E.E. Yelland, evidentiĝis, ke oni sendis ĝin al nia redakcio nur tial, ke la dirita esperantisto ne trovis ĝian tekston en la « Originala Verkaro ». Temis pri eraro, ĉar fakte ĝi kuŝas tie je p. 471-472 ; tamen s-ro Yelland precizigis, ke temas ne pri letero, sed pri poŝtkarto. Alifanke la vera dato ne estas « 1914 », sed ja « 14/X/1913 », kiun s-ro Yelland memoras laŭ faksimila reprodukto, aperinta en la gazeto « Liberpensulo ».

Paul CILIGA.

N.B. Pro kaŭzo nekonata s-ro Waringhien uzis la ortografion « Sébert » en la duvoluma kolekto « Leteroj de Zamenhof », kvankam la bone konata fondinto de l'iama Centra Oficejo ĉiam skribis « Sebert » ...sen la erare almetita supersigno.



En grup-kunveno debatu pri la Revuo : viaj komentoj estos studataj.

LIBERA TRIBUNO

Unu el la nepraj devoj de ĉiu Esperantisto

Nia amata lingvo daŭre evoluas. Ĝi ja ne estas rigide poreterne fiksita sistemo. Tio estas plej bona kaj obeas la principojn kiujn nia Majstro mem plej saĝe alprenis de la komenco.

Tiun konstantan kaj malrapidan evoluadon ni ĉiuj, precipe la malnovaj Esperantistoj, kiaj mi, povas konstati ĉiutage legante niajn gazetojn, ĉefe niajn literaturajn (ĉu poeziajn aŭ ne) verkojn.

Tre ofte oni renkontas novajn radikojn, kiuj venas, prave neprave, por anstataŭi malnovajn, ĉar la verkinto eble opiniis, ke tiuj ĉi estas tro pezaj aŭ nesufiĉe precizaj. Kaj tio estas sendube la normala dezirita evoluado.

Sed, kontraŭe, la esperantistoj devas juĝi ankaŭ ĉu la al ili proponitaj novaj radikoj estas nepre necesaj, kaj ili devas malhelpi la disvastiĝon de la necesaj... unue ne uzante ilin !

Ekzemple mi opinias, ke tro ofte en la bonega vortaro Esperanto-Français de Waringhien ni trovas vorton ligitan per la signo = al alia, kies do signifo estas la sama (kelkafoje unu ŝajnas el ne latina origino, la dua el latina). Mi tre bone scias ke en niaj « ricaj » naciaj lingvoj ni havas ofte tiajn duoblajn esprimojn por sama objekto aŭ ideo. Eĉ en nia franca lingvo oni provas ne uzi dufoje en sama frazo la saman radikon, kiam ekzistas alia samsignifa !

Sed ĉu jam nun, kiam nia lingvo devas ankoraŭ allogi, altiri, varbi al ni grandajn amasojn, ĉu ni devas rezigni tiun iam plej veran argumenton = Esperanto estas *facile* lernebla. Ni devas zorgi, por ke tiu facileco estu ĉiam reala !

Ni lasu do por pli agrablaj tempoj, t.e. kiam Esperanto estos ĉie kaj de ĉiuj parolata kaj studata, tiun emon krei plurajn radikojn por sama objekto aŭ ideo. Ni nepre nun (kaj estonte estos same !) devas ankaŭ konservi la internaciecon kaj unuecon de niaj radikoj, por ke ne estu iu Esperanto uzata en parto de la mondo kaj alia, ne tute simila al la unua, uzata en la cetero de la globo.

For de mi la intencon rekrei la diskuton de antaŭ 1914 pri tia temo sed ŝajnas al mi, ke ni ĉiuj devas konscii pri niaj devoj al nia amata lingvo kaj agi konsekvence.

Léon BELHOSTE.

N. de R. — Simpla demando : ĉu ne estus necesa la vostradiko « *abelo* », se la esprimo « *mielmuŝo* » sigaus la saman estaĵon ?



INVITO AL BRUSELO (daŭrigo)

selo jam de longa tempo komprenis, ke la paca kunvivado ne povas baziĝi sur la hegemonio de unu lingvo, sed sur la egaleco de la lingvoj.

Tiu principo, portita sur tutmonda kampo, montras, ke la solvo de la lingva problemo ne povas esti serĉita, donante privilegion al unu aŭ al kelkaj lingvoj, sed per justa konvencia elekto, kiu ne ofendu ies sentojn, kiel Esperanto proponas.

Bruselo, kiu en la lastaj jaroj leviĝis ĝis la unuaj rangoj inter la eŭropaj ĉefurboj, larĝe malfermas siajn pordojn al la esperantistoj, kiuj venis el la kvin kontinentoj por kongresi en ĝi.

Ĝi ne nur malfermas siajn grandajn bulvardojn, siajn muzeojn, kie generacioj da artistoj amasigis artajn trezorojn, ĝi ne nur malkovras siajn monumentojn kaj siajn arkitekturojn, sed ĝi malfermas la koron de siaj enloĝantoj por gasta kaj ĝoja bonveno. »

el « Belga Esperantisto » (51-a jaro-n-ro 6).

Dans son numéro 571, du 19 mars 1960, Paris-Match, a fait paraître ce télégramme :

« Emissions de la Voix de l'Amérique en Espéranto à destination du monde entier. »

EDITIONS FRANÇAISES D'ESPERANTO

11, rue Paul-Vergnes, Marmande (Lot-et-Garonne)
C.C.P. Bordeaux 30.900

Actuellement disponibles :

AFFICHES 80 × 60, en papier de couleur résistant au soleil, convenant pour expositions, salles de réunions, affichage public, etc. et comportant les textes suivants :

1. Vœu de l'Académie des Sciences. — 2. Résolution de l'U.N.E.S.C.O. — 3. Résumé de la Pétition. — 4. L'Espéranto en Chiffres. — 5. L'Espéranto, Langue naturelle. — 6. Opinion d'Antoine Meillet. — 7. Opinion de Maurice Genevoix. — 8. Opinion de Georges Duhamel. 9. Opinions de Pie X et Benoît XV. — Chaque affiche : 1 N.F.

LE DOCTEUR ESPERANTO, par M. Ziolkowska. La vie du Dr. Zamenhof, éditée pour la première fois en français, à l'occasion du Centenaire de la naissance de l' « Initiateur » de l'Espéranto. Par la richesse de sa documentation ce livre constitue un excellent moyen d'information à offrir comme cadeau, ou à faire circuler. Devrait se trouver dans toute bibliothèque moderne. Volume de 168 pages.

Edition brochée : 6,50 N.F. — Edition reliée : 13,50 N.F.

Les prix indiqués ci-dessus ne comportent pas les frais d'envoi ; MM. les libraires, les professeurs d'Espéranto et les groupes ont droit à la remise habituelle.



SOMERA PEDAGOGIA SEMAJNO

Bohinj, Jugoslavio, 15-25 de julio 1960

Sub la aŭspicio de UEA kaj la Nacia UNESKO- komisiono de Jugoslavio, la lerneja Komisiono de JEF kaj en kunlaboro kun Jugoslavia Asocio de Pedagogoj-Esperantistoj, aranĝas ĉi-jare la duan Someran Pedagogian Semajnon : estos utilaj interŝanĝoj de spertoj inter diverslandaj pedagogoj pri la instruado al lernantoj de elementa lernejo.

Ĉi jara internacia lerneja kampanjo de UEA donas al tiu ĉi aranĝo taskon organizan. Tiel estos pritaktataj ankaŭ la problemoj pri la rolo de esperantistaj organizajoj, precipe de ILEI kaj TEJO kun siaj landaj sekcioj.

★

Kiu partoprenos ?

En la unua vico la **instruistoj,** kiuj instruas al la infanoj en lernejoj (el Jugoslavio, Danlando, Finnlando, Nederlando, Francujo, Britujo, Svislando, Svedlando, Pollando, Bulgario, kaj aliaj estos ankoraŭ invitataj). Poste la junularaj esperantistaj grupoj aŭ almenaŭ iliaj gvidantoj laborantaj en lernejoj, kiuj alportu siajn spertojn en la organiza laboro, kultura, eduka, distra kaj amuza vivo. Inter ili aparte estas invititaj la redaktoroj kaj la plej aktivaj kunlaborantoj en « Grajnoj en Vento ».

★

La programo konsistos el :

La ĉefa temo : « La praktika apliko de Esperanto en lernejo post akirita lingvoscio »,
a) ĝenerala rolo de Esperanto en lernejo kaj
b) resumo de problemoj ligitaj al ĝi.

— Kompletigado de instruprogramo

— Esperanta literaturo kiel kompletiga legaĵo.

Ekspozicio de legolibroj, bildverkoj, turismaj prospektoj, UNESKO-afiŝoj, turismaj afiŝoj, esperantaj revuoj, ktp.

— kultura kaj kleriga laboro en lernejoj

— interna vivo de lerneja grupo

— esperantista grupo kaj aliaj junularaj organizajoj.

Ekspozicio de literaturo poezia, drama, muzika, lernejaj gazetoj, junularaj gazetoj esperantistaj, « Grajnoj en Vento » kaj aliaj materialoj bezonataj en grupa laboro, kun prezento de celadoj de aliaj junularaj organizajoj por ni interesaj (naturamikoj, sportoj, ruĝa kruco, feraj laborbrigadoj kaj civila servo, ktp).

RIM : Helpo en ekspozicio-materialo varme estas petata !

★

Restadkondiĉoj : La pliaĝuloj loĝos en la Domo, la junuloj en la tendoj kun du litoj komforte ekipitaj. Kvarfoja manĝado komuna en la Domo.

Restadkostoj : kompleta prizorgo 600.-dinaroj aŭ egalvaloro. Por prelegantoj kaj aliaj aktivaj kunlaborantoj ni verŝajne sukcesos prizorgi senpagan aŭ rabatitan restadon. La interesatoj anoncu sin al Jugoslavia Esperanto-Federacio, Ljubljana, poŝtfako 275. Detalajn informojn nur al la aliĝantoj.

★★★

VOĈO DE AMERIKO ELSENDOS TRI PROGRAMOJN EN ESPERANTO EN JUNIO KAJ JULIO

La Voĉo de Ameriko preparas serion de tri radioprogramoj en Esperanto elsendotaj en tri sinsekvaj vendredoj, la 24-an de junio, la 1-an de julio kaj la 8-an de julio 1960. Ĉiu 30-minuta programo estos disaŭdigata trifoje por atingi diversajn partojn de la mondo. Unu enhavos informojn pri eduko kaj lernejoj en Usono, ĉar tio estas temo, pri kiu alvenis multaj demandoj el la tuta mondo, ankaŭ novan parton en la rubriko « Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko » kaj eble intervjuon. La aliaj du programoj estos ripetoj de la programoj de la 1-a kaj 8-a de aprilo, kiujn multaj aŭskultantoj ne sukcesis ricevi. La 1-an de aprilo magnetaj disturboj en la ionosfero malebligis kontentigan ricevon de mallongondaj programoj en preskaŭ la tuta mondo. La 8-an de aprilo pro teknikaj kaŭzoj la Esperanto-programo ne troviĝis sur du el la kvar ondlongoj anoncitaj.

En la tri vendredoj la Esperanto-programo de la Voĉo de Ameriko estos aŭdebla je la 11-a (laŭ la horsistemo de Greenwich) sur la ondlongo de 41,90 metroj (7160 kilocikloj), ĉefe en Orienta Azio, je la 12-a sur la ondlongo de 19,72 metroj (15210 kcs), ĉefe en Sud-orienta Azio, Madagaskaro ktp., je la 22-a sur la ondlongoj de 31,19 metroj (9620 kcs) kaj 25,22 metroj (11895 kcs), en Eŭropo kaj la apudaj regionoj de Azio kaj Afriko, ankaŭ en kelkaj amerikaj landoj. La diversaj programoj ankaŭ estas aŭdeblaj en aliaj partoj de la mondo.

La 24-an de junio la Voĉo de Ameriko prezentos literaturan programon, « La Usona Romano kaj Gia Tradicio », kun elĉerpaĵoj el libro de Richard Chase, intervjuon kun D-ro Stephen Zamenhof, Profesoro de Biokemio en la Medicina Fakultato de la Columbia-Universitato en New-York, pri D-ro L.L. Zamenhof (lia onklo) kaj la Zamenhof-familio, intervjuon kun S-ino Connie Davis pri Esperanto-kursoj en lernejoj por plenkreskuloj, intervjuon de Clare Soponis kun C. Stanley Otto pri la Skolta Esperantista Ligo, kaj respondojn al demandoj pri Esperanto en Usono.

La 1-an de julio diskutrondo pritraktos la Usonan Ekonomian Sistemon. Partoprenos Reed Irvine, de la Federacia Rezerv-Banka Sistemo, Gadsden Shand, de la Esplora Fako de la Registara Oficejo pri Malgrandaj Entreprenoj, Thomas Adler Goldman, de la Kompanio por Ekonomia kaj Industria Esploro, kaj D-ro William Solzbacher, de la Voĉo de Ameriko. En la Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko Mark Starr respondos al du demandoj pri la manko de grava socialdemokrata partio en Usono. Aliajn demandojn respondos la regulaj kunlaborantoj de la programo : F-ino Clare Soponis, F-ino Eve-Marie Solzbacher, S-ro John Petraitis kaj D-ro William Solzbacher.

La 8-an de julio la Voĉo de Ameriko disaŭdigos programon pri la Usona Eduka Sistemo, alian programon en la rubriko de la Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko kaj verŝajne intervjuon kun eksterlanda eminentulo vizitanta Uzonon.

Raportojn pri la ricevo kaj opiniesprimoj pri la enhavo oni sendu al D-ro William Solzbacher, Voice of America, Rm. 2528, HEW, Washington 25, D.C., Usono. Bonvolu ne plu sendi demandojn por la rubriko Demandoj kaj Respondoj pri Ameriko, ĉar la Voĉo de Ameriko ricevis pli ol 350 demandojn de Esperantistoj el la tuta mondo.

★★★

MAISON CULTURELLE ESPÉRANTISTE

CHÂTEAU de GRÉSILLON

BAUGÉ (M. & L.)

Nous avons publié dans un précédent N° la liste des séjours prévus au château de Grésillon durant l'Eté 1960.

Nous attirons aujourd'hui l'attention de nos lecteurs sur le **séjour :**

— du 28 août au 11 septembre 1960 —

Cours pratique et Supérieur d'Esperanto

sous les auspices de l'U. E. F. et sous la direction de M. RIBOT

Vous venez d'apprendre l'Espéranto — ou vous allez le faire — ; vous avez assimilé les règles de la grammaire et appris le vocabulaire courant ; grâce à cela, la rédaction d'une lettre ou la lecture d'un journal ne doit plus présenter pour vous beaucoup de difficultés.

Cependant, vous vous rendez compte que vous ne maniez pas encore la langue internationale avec la même aisance que le français.

N'en soyez pas surpris ! Vous avez acquis jusqu'à présent une bonne base à laquelle vous devez maintenant apporter son complément naturel : la PRATIQUE, qui vous permettra de parler couramment.

Pour une langue étrangère, vous savez qu'un séjour de plusieurs mois à l'étranger est nécessaire ; pour l'espéranto, un stage de deux semaines à la Maison Culturelle des Espérantistes, Château de Grésillon, à Baugé (M.-et-L.), vous suffira pour parfaire vos connaissances.

A l'intention de ceux qui, comme vous, sentent le besoin de pratiquer la langue, l'Union Espérantiste Française organise à la M.C.E. un stage de quinze jours dont le programme vise un double but :

1) Approfondissement des connaissances grammaticales par le Cours Supérieur d'Espéranto ;

2) Cours de conversation, pour arriver à parler la langue couramment.

A la fin du stage, tous les stagiaires passent l'un des examens organisés par l'Institut Français d'Espéranto.

Lever : 8 heures — Petit déjeuner : 8 h. 30 — Leçon de grammaire : 9-11 heures — Leçon de conversation : 11-12 heures — Dejeuner : 12 h. 30, puis temps libre jusqu'à 16 h. 30 — Explications de textes et questions orales : 16 h. 30-17 h. 30 — Jeux en espéranto : 17 h. 30-18 h. 30 — Souper : 19 heures — Après souper : veillées organisées ou temps libre.

Vous voyez que ce programme n'a rien d'exagéré ! Tout en respectant cette époque des vacances, sacrée à juste titre, il vous permet d'arriver en peu de temps et dans des conditions de séjour fort agréables, à posséder une bonne connaissance de la langue.

Convaincus que vous comprendrez la nécessité de ne pas arrêter à mi-chemin vos études espérantistes, mais d'aller jusqu'au bout, nous vous donnons donc rendez-vous le 28 août 1960 à la Maison Culturelle Espérantiste où tout renseignement d'ordre pratique vous sera fourni contre enveloppe timbrée à votre adresse envoyée à : CHATEAU DE GRESILLON, Baugé (M.-et-L.).

CATALOGUE U. E. F.

AVRIL 1960

	NF
Affiche 40×60	0,10
Affiche 80×60 (textes divers)	1,00
Blason tissu « Esperanto parolata »	2,60
Carte postale « Esperanto »	0,10
Carte postale portrait du Dr Zamenhof	0,30
Carte postale avec étoile verte	0,05
Enveloppe avec étoile verte	0,05
Fanion en toile pour bicyclette ou voiture	1,40
Insigne (bouton ou broche)	1,10
Papier à lettres avec étoile verte, bloc de 100 feuilles lignées ou non, format 13,5×21	2,20
format 21×27	3,20
Photographie du Dr Zamenhof 10,5×16	0,50
Tract grammaire et vocabulaire	0,10
L'Esperanto cet inconnu (Ribot)	1,25
Valeur pédagogique de l'Esperanto	0,60
Programme des examens	0,25

ETUDE ET ENSEIGNEMENT

ABC de Waringhien	1,50
Dialekto, Dialektiko (Dalmaŭ)	3,50
Esperanto kaj Lernejo (Slovenia-Ligo)	10,00
Esperanto Legolibro (Migliorini)	3,75
Esperanto-Manuel (Chavet-Warnier) avec corrigés	5,00
Esperanto por Infanoj (Solomon)	2,10
L'Eperanto facile (Gaume)	3,00
Konversacia Literaturo (8 broch. méthode directe)	1,80
Manuel d'Etude (Couteaux) avec corrigés	4,50
Manuel d'Initiation (Thaillet)	1,50
Ni parolu en Esperanto (Ribot)	4,00
d° corrigés	0,70
Plena Gramatiko (vol. I)	12,00
Privilegia Vojo al Lingvoscio (Setala)	6,00
Ŝlosiloj diversaj	0,40
Traduko de la Provtekstoj en la Gvidlibro	1,00
Unua Legolibro (Kabe)	1,75
Universala Legolibro (Fricke)	1,75

DICTIONNAIRES, LEXIQUES ET VOCABULAIRES

Dictionnaire Français-Esperanto (Grosjean-Maupin)	8,10
Fervoja Terminaro (Rosher)	1,70
Gastronomia Terminaro	4,55
Grand Dictionnaire Esperanto-Français (Waringhien)	28,30
Lexique Esperanto-Français (Léger)	5,40
Matematika Terminaro	1,25
Militista Vortareto	1,20
Les Mots Esperanto groupés (Bobin)	1,00
Naŭlingva Etimologia Leksikono (Bastien)	10,00
Plena Vortaro	12,50
Scienca Terminaro	19,60
Vocabulaire de poche (Bastien)	2,20

LA MOVADO (Lingvo, Historio)

	NF
Le Docteur Esperanto (M. Ziolkowska)	6,50
La Esperanto Klubo (Malmgren)	1,10
La Esperanto Movado (Stop-Bowitz kaj Isbrucker)	2,80
Historio de la Lingvo Esperanto (Privat)	8,10
La Internacia Lingvo (Lapenna), bind	8,00
Leteroj de L.L. Zamenhof (Waringhien) I kaj II binditaj	19,00
Originala Verkaro de Zamenhof, bindita	15,75
Per Kio ni amuzu nin ? (Rosenberg-Malmgren)	1,10
Retoriko (Lapenna), bindita	15,40
Vivo de Zamenhof (Privat)	4,50

LITERATURO (Prozajoj)

Abismoj originala romano (Jean Forge)	3,15
Akbar (Limburg Brouwer), bindita	5,00
La Alaska Stafeto (Omelka), bindita	4,20
La alia Pasinteco (Bulthuis), bindita	7,00
La Amo en la Jaro Dekmil (Ignotus), bindita	5,25
Angla Antologio (Auld kaj Rossetti)	14,00
Anstataŭa Edzino (Maxwel), bindita	4,20
Aventuroj de Malspertulo (Reitzel), bindita	0,60
La Aventuroj de Marteno Drake (G. Norway), bindita.	4,20
La Aventuroj de S-ro Longkrurulo (Uitterdijk)	1,75
Barbro kaj Eriko (Schneider kaj Carlsson)	0,75
Brulanta Sekreto (Stefan Zweig)	3,30
Colomba (Mérimée)	1,70
Doktoro Dorner (Egurrup)	5,60
El la Maniko (Rossetti)	10,00
Eseoj I (Waringhien)	10,00
Fabiola (Kardinalo Wiseman)	6,30
La Firmao de la Kato kiu pilkludas (Balzac)	1,05
La Forto de l'Vero (Adi)	3,30
La Ĝoja Podio (R. Schwartz)	4,00
Hebreaj Rakontoj (Alehem)	1,05
Les Héros Existentialistes dans l'œuvre de J.P. Sartre (Colette Llech-Walter) texte bilingue	2,00
La Hundo Kruso (Ballantyne)	2,10
Infanoj en Torento (St. Engholm) I kaj II kune	5,60
Invito al Ĉielo (J.D. Sayers)	6,30
Karlo (Privat)	1,05
La Karnavalo kaj la Somnambulino (Immermann)	3,30
Kiso de la Reĝino (Najivin)	3,30
Koko krias jam! (Szilagyi)	10,00
Kredu min Sinjorino! (Rossetti), bindita	7,80
Lingvo kaj Vivo (Waringhien), bindita	20,00
Miru, Pensu, Ridu (Bennemann), bindita	7,50
Misteroj de l'Vivo (Bogh-Hogsted)	3,50
Morto de Trajno (Crofts), bindita	7,50
La Naiveco de Pastro Brown (Chesterton), bindita	4,20
La Normandaj Rakontoj (Maupassant), bindita	16,80
Novaj Esperanto-Historietoj (div. aŭtoroj)	2,50
Palaco de Danĝero (Mabel Wagnalls), bindita	4,90
Princino de Marso (Burroughs)	1,70
La Princo kaj Betty (Wodehouse)	1,70
Saltego trans Jarmiloj (Jean Forge)	3,15
Sep Vangofrapoj (Aszlanyi)	3,30
Taglibro de Anne Franck, bindita	10,75
La Tempo-Maŝino (H.G. Wells)	1,70
Undino (Schreiner), bindita	4,50
Victoria (Knut Hamson)	4,20
La Virineto en Bluo (Mason Stuttard)	3,30
La Vojo Returne (Remarque), bindita	4,20

TEATRO KAJ POEZIO	NF
Antonio kaj Kleopatro (Shakespeare)	2,10
La Bapto de Caro Vladimir (Havliĉek)	10,00
Eroj (M. Boulton)	12,50
Esperanta Antologio. Poemoj, bindita 21,50, broŝ.	18,50
Fabloj de La Fontaine	2,00
La Floroj de l'Malbono (Beaudelaire)	13,40
La Gajaj Edzinoj de Windsor (Shakespeare)	2,10
Georgo Dandin (Molière)	2,65
La Infana Raso (W. Auld)	10,00
Jozefo (Applebaum)	5,60
Kontralte (M. Boulton)	10,00
La Mokindaj Preciozulinoj (Molière)	1,20
Pasko (Strindberg)	5,50
Peer Gynt (Ibsen), bindita	11,20
Poemoj de Omar Kajam	2,50
La Revizoro (Gogol)	4,30
Romeo kaj Julieto (Shakespeare)	2,10
Sinjoro Tadeo (Mickiewicz), bindita	8,50
Sonĝe sub Pomarbo (Baghy)	10,00
La Stranga Butiko (Schwartz)	2,80
RELIGIO KAJ FILOZOFIO	
Maksimoj de la Rochefoucauld (franca kaj esperanta kune)	2,00
La Nova Testamento, bindita	2,50
Papo Pio X beata	3,35
Sankta Biblio, bindita	10,00
La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo (Dickens), bindita	5,00
SOCIOLOGIO KAJ POLITIKO	
Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo (Lapenna)	7,00

	NF
Federala Sperto (E. Privat)	3,15
GEOGRAFIO — VOJAĜADO	
Aŭstralio — Lando kaj Popolo	3,50
Ekspedicio Kon-Tiki (Heyerdahl), bindita	18,50
Pariza Gvidlibro Ilustrita	2,50
De Parizo al Lazura Marbordo (Rétot)	1,60
Pola Folkoro (Grenkamp)	2,00
Adrejaro por internaciaj vojaĝantoj (Rétot)	1,20
ARTO, KOMERCO, SCIENCO KAJ TEKNIKO	
La Arto fariĝi Centjara (Wegener)	2,80
Atakoj kontraŭ Ĝardenplantoj (Neergaard)	15,40
Pri Bredado de Abeloj (Andersen)	4,20
La Vivo de la Plantoj (Neergaard)	11,20
Eta Interpretisto Franca (Rétot)	1,20
KANTOJ	
Koncerta Kantaro (Brederode kaj Veldkamp)	3,85
Internacia Kantaro (Benneman) ...... vortoj	1,75
muziknotoj	4,55
GRAMOFONDISKOJ	
Disque de prononciation	4,00
Parolado de Lapenna	8,50
Melodioj (La Espero, Ĉeriz'Tempo, Fontano klara)	12,00
Diversaj Melodioj (kvarvoĉe) I, II, III, ĉiu	9,00

Frais d'expédition et de poste:

20 % jusqu'à 10 fr.; 15 % jusqu'à 20 fr.; et 10 % au-dessus. Toutes les commandes sont à adresser, avec les fonds, à: Union Espérantiste Française, 34, rue de Chabrol, Paris (10e). C.C.P. 855-35 Paris.

Sveda Esperantista Junularo-Unuiĝo kaj Klubo Esperantista de Skövde aranĝos, la 24-26 de junio 1960, la 3-an

MEZSOMERAN JUNULAR-RENKONTIĜON

je « Sismjön », belega monta lago proksime de Sköde. Ni disponas propran vilaon tute proksime al la lago kun riĉaj eblecoj por bano, kanot- kaj velboat-sporto. Dum la tradiciaj mezsomeraj festotagoj estos aranĝoj kun dancado ĉirkaŭ tipe sveda « mezsomera stango », ludoj kaj konkursoj per boatoj kaj aliaj eventoj.

Kotizo (en kiu loĝado kaj manĝado estas enkalkulitaj) estas nur 15 svedaj kronoj (-3 dolaroj) por eksterlandanoj. Se iu volas plilongigi sian restadon, li aŭ ŝi pagos 5 svedajn kronojn (-1 dolaro) ĉiutage.

Aliĝoj kaj *informoj* ĉe Börje Anderson, Ingegatan 4 A, Skövde, Svedujo.

Deziras korespondi kun belgaj esperantistoj de Bruselo, Bruĝo kaj Antverpeno, S-ino SOULAT, 20, rue de la Corderie, Paris.

ERRATUM

Dans le numéro 190 (avril 1960) nos lecteurs ont certainement remarqué la faute d'imprimerie qui s'est glissée dans le texte de la page 59; il fallait lire : La notion de « langue *naturelle* » est certes, très équivoque.

Por komercaj pres-laboretoj (leteroj, fakturoj, kovertoj).

Ets BARDOULET & Cie, 11 *bis*, passage Hébrard, Paris-Xe. Tél. : NORD 66-27.

Samideana entrepreno.

DU DESEGNAJ HUMORISTOJ el Barcelono, JOSO kaj BELTRAM serĉas por la monato septembro parizan samideanon, kiu konsentus gastigi ilin kontraŭpage.

Skribi al S-ro Jaime BELTRAM. Canuda, 45, piso 1° puerta 7°, Barcelono, Hispanujo.

Langres. — Imprimerie Moderne

Le Gérant : J. GUILLAUME